

la **Espero**

1989:5

SVENSKA

ESPERANTOTIDNINGEN

Nu i varje nummer:

POR KOMENCANTOJ

Lättlästa artiklar
om allehanda saker

KALENDARO

Vad som kommer att hända;
och var, i esperantovärlden

NIA LINGVO

Artiklar om språkfrågor
och Akademi-meddelanden

Redaktoro:

Kiel vi eble jam scias mi translokiĝis de Uppsala al Luleå. En Uppsala mi dum unu jaro laboris kiel informsekretario en Sveda Evangelia Misio (Evangeliska Fosterlands-Stiftelsen). Mi ne estas membro de tiu organizaĵo, do mi dum mia laboro iom post iom konatiĝis kun ĝi. Tre impresis min la sindonemo de la membroj. Cu vi povas imagi ke EFS-ano meze ĉiujare donacas 3500 kronojn al EFS (al societo, distrikto kaj landa organizaĵo kune).

Cu ni esperantistoj estas same donacemaj? Bedaŭrinde ne. Mi kredas ke tio estas unu el la aferoj, kiun ni devas plibonigi por ke esperanto disvastiĝu pli bone. Ne mankas ideoj en la movado, sed mankas mono por efektiviĝi la ideojn.

Mi tamen kredas ke ni povos ŝanĝi tiun ĉi situacion. Ni komencu tuj! Ni povas donaci regule aŭ subite. Ni povas menciigi Svedan Esperanto-Federacion en testamento. Se la donacado fariĝos kutimo, ni rimarkos ke estas ĝojo donaci!

Leif Nordenstorm

Deziraskorespondi

- Du 13jaraj lernantinoj volas korespondi kaj interŝanĝi poŝtkartojn kaj bildkartojn: Jolanta Kulbyte Str Gelovonu 50-14, SU-232010 Vilnius, Litovio, Sovetio; Ramune Markelyte, Str Gelvonu 10-20, SU-232010 Vilnius, Litovio, Sovetio.
- 32jara instruistino: Jadviga Chmielewska, ul. Wyspianskiego 8/58, PL-25-409 Kielce, Pollando.
- Neijiang-a Esperanto-Asocio kaj ĝiaj membroj deziras korespondi pri diversaj temoj: NEA, c/o Les Lo, Neijiang Construction Bank, 641000 Neijiang, Ĉinio.
- Akceptas gastojn. Skribe petu antaŭe! Jiri Pla'sil, 7 Listopadud 221, CS-530 02 Pardubice, Ĉeĥoslovakio.

La Espero

Organ för Svenska Esperantoförbundet

Adress: EsperantoCentro, Brunnsgatan 21, 111 38 Stockholm, tel. 08-11 74 34

Ansvarig utgivare: Leif Nordenstorm

Redaktör: Leif Nordenstorm, Munkebergsgatan 38, 3 tr., 95156 Luleå, tel. 0920-279 78

Sättning: Per Aarne Fritzon och Leif Nordenstorm

Utformning: Franko Luin/Omnibus

Tryck: EsperantoCentro, Stockholm 1989

Esperantoförbundet

Adress: EsperantoCentro, Brunnsgatan 21, 111 38 Stockholm, tel. 08-11 74 34

Öppettider: Vintertid alla vardagar, men säkrast måndag och torsdag kl 11 - 13 och 17.30 - 19.

Postgiro: 20 12-3, Esperantoförbundet

Medlemsavgift 1990: Direktansluten medlem 125 kr. Familjemedlem (utan tidning) 50 kr. Ungdomsmedlem 50 kr.

Enbart prenumeration: 125 kr. Gåvoprenumeration till utlandet: 65 kr. Prenumerationsavgift för *La Espero* ingår i medlemsavgiften.

Medlemmar under 30 år är samtidigt medlemmar i Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund och får dess tidning *Kvinpinto*. Om du inte får den, meddela ditt födelseår till EsperantoCentro.

SEFs styrelse

Ordförande: Karin Lindquist, Västermovägen 19, 732 49 Arboga, tel. 0589-155 31 (Nordiskt samarbete)

Vice ordförande: Märtha Andréasson, Tolsered Pl. 2265, 425 90 Hisings Kärra, tel. 031-57 11 33 (Årskongresser, ekonomifrågor)

Sekreterare: Ulla Luin, Myggdalsvägen 123, 135 42 Tyresö, tel. 08-712 82 91 (kansliet, massmedier)

Kassör: Börje Andersson, Ingegatan 4A, 541 50 Skövde, tel. 0500-12205 (massmedier)

Styrelseledamot: Kerstin Rohdin, Fack 142, 579 00 Högsby, tel. 0491-20461 (turnéer, bibliotek)

Styrelseledamot: Bertil Andreasson, Södra Rörum Pl. 455, 242 94 Hörby, tel. 0415-501 52 (utbildning, nordiskt samarbete)

Styrelseledamot: Haldo Vedin, Jordbrogatan 57, 603 64 Norrköping, tel. 011-16 26 87 (intern.org.)

Suppleant: Per Aarne Fritzon, Möregatan 9, II, 116 27 Stockholm, tel. 08 - 408892

Suppleant: Leif Nordenstorm, Munkebergsgatan 38, 3 tr., 951 56 Luleå, tel. 0920-279 78

Esperantoförlaget

Postadress: Box 7502, 200 42 Malmö

Besöksadress: Möllevångsgatan 20B, Malmö

Telefon: 040-12 20 29

Postgiro: 578-5

Öppettider: 1 september - 15 maj: onsdagar 10 - 11, torsdagar 17 - 18.

Skriftliga beställningar expedieras under hela året.

Expedition: Wivi Nilsson

Styrelsens ordförande: Tomas Jansson.

Enhavo

- 68 Niaj propraj bildrakontoj
69 TRA LA MONDO:
Broŝuro pri Koreio
Internacia ekspozicio
Konkurso pri romanoj
Ĉinaj esperantistoj serĉas laboron
Svahillingva lernolibro
Literatura Foiro dudekjara
Biblioteka terminaro
Ĝojaj kaj malĝojaj novaĵoj
Nova redaktanto de Dia regno
Paŝadi tra Kubo
Vojaĝi polimarane
Nova adresaro de Komputila Rondo
70 Ĉiutaga esperanto: Iom pri gazetoj kaj periodaĵoj
Verki artikolon
71 Tial ni ekzistas
72 Oficialaj informoj de la Akademio de Esperanto
76 "Moskvaj Novaĵoj" en Esperanto!
Nu tre "nycklar"
77 Hur tar vi vara på föreningskvällarna?
KALENDARO
78 Pli da svedoj sukcesu en Belartaj Konkursoj
Pensiulo
79 TRA LA LANDO:
Sveda akademiano
Kultura Esperanto-Festivalo
Nova nomo
Kristliga Esperantoförbundet
Radio Esperanto por tuta Skanio
Kie estas la bengala libro?
Esperantolitteratur i Göteborg
80 SEJU

Prezidanto:

1992: Esperanto por la Eŭropa Komunumo!

En la Eŭropa komunumo, kun ties 12 landoj kaj 9 oficialaj lingvoj, oni starigos komence de la 1990-aj jaroj liberan komercon kaj liberan labormerkaton. Jam oni diskutas pri komuna valuto kaj pri kunlaboro sur la kampoj de edukado kaj multtekosta esploro.

Cio ĉi signifas, ke en la Eŭropa Komunumo la kondiĉoj fariĝos similaj al tiuj de unu granda ŝtato. Per la supra procedo, ĉiuj komunaj bezonoj kontentiĝos. Estas nur unu komuna problemo, kiun oni "tro bone" evitis: La lingva problemo. Pro iu nekomprenebla motivo, oni permesis al si trakti tiun problemon en tre mallerta maniero. Oni solvis ĝin per enkonduko de pli kaj pli multaj lingvoj, je pli kaj pli altaj kostoj – same kiel multaj aliaj internaciaj organizoj. Kial?

La problemo estas igi tiel grandegan organizon kiel la Eŭropan Komunumon praktike enkonduki unu lingvon. Meti milojn da ofici-stoj ĉe la pupitron por lerni Esperanton – ĉu eblas?

Laŭ mi ni devas koncentriĝi je la juna generacio. La lernejo devas esti nia ĉefa celgrupo. Eble laŭ la franca modelo? Mi citas el letero al la francaj parlamentanoj okaze de tio, ke Francio okupis la prezidantecon ĉe la Eŭropa Komunumo:

"Ni opinias – unua opcio – ke la plej efika kaj solidara solvo estas



adopti neŭtralan lingvon, kiu ebligas la kompreniĝadon inter ni ĉiuj, kun identaj eblecoj por ĉiuj, sed ni ne pretendas je monopolo kaj agnoskas, ke eble la adapto de Esperanto kiel solan oficialan lingvon estas por iuj ankoraŭ tro drasta. Ni mildigu tiun solvon kadre de la "Programo lingva", kiu celas la instruadon de du lingvoj (krom la gepatra) ĉe la diversaj edukaj sistemoj. Inter tiuj du povas troviĝi Esperanto. Tiamaniere – dua opcio – oni studas la gepatran, fremdan kaj internacian lingvojn. Ni vidus, post nur tri jaroj, kiuj eŭropanoj perfekte kaj egalrajte interkompreniĝos per kiu lingvo.

Sed ĉar ni estas malfermitaj al ĉia solvo pozitiva, ni ankoraŭfoje mildigu la aferon per tria opcio: Oni povus laŭgrade enkonduki Esperanton en la lernejon, nur kiel nedevigan lingvon. Ni same vidus la rezultojn post nur malmulte da jaroj."

Sed tio ne signifas, ke ni ĉesu prilabori aliajn por ni interesajn celgrupojn. Kontraŭe – ni devas pli intense prilabori multajn aliajn, ĉar ni ja scias la proverbon pri la guto, ĉu ne?

Karin Lindquist

Niaj propraj bildrakontoj

Verkistoj kaj aliaj kulturaj fakuloj en Svedio dum la lastaj jaroj ekkomprenis ke multaj gejunuloj, eĉ ĝis tridekjaraj, malofte aŭ neniam legas librojn, sed nur revuojn kun bildrakontoj. Tiuj ĉi kulturuloj skribis gazetartikolojn, kaj multe parolis pri la afero. Ili timas ke la kulturo mortos for, se ĉiam pli multaj gejunuloj legos nur bildrakontojn, La amantoj de bildrakontoj ne samopinias. Laŭ ili bildrakontoj ne estas nur porinfana afero, sed vera kulturo.

Inter esperantistoj la problemo estas tute alia. Ĉiujare aperas multaj libroj kun rakontoj kaj poezio en esperanto. Tamen nur malmultaj libroj kaj, laŭ mia scio, neniu revuo, kiuj enhavas nur bildrakontojn. La bildrakontaj libroj ne estas originalaj, sed tradukoj. Do, niaj 'propraj' originale esperantaj bildrakontoj estas tre malmultaj, kaj aperis dise en diversaj revuoj. Tiu ĉi artikolo estas malgranda provo priskribi ilin.

En la revuo 'La Kancerkliniko' jam dum dek jaroj aperis la bildrakontoj de Hera Elik kaj Serge Sire. Ili havas multajn malsamajn nomojn, ekzemple: *Maledeno*, *Aventuroj de pastro Petro-Petro* kaj *La Rejnoro*. La bildoj de Elik kaj Sire estas klaraj kaj belaj. La rakontoj estas, laŭ mi, iom malpli klaraj. Fakte mi ne ĉiam komprenas la rakonton. Plej ofte mi tamen bone komprenas ĝin, kaj rekonas min mem kaj la homojn ĉirkaŭ mi en la rakontoj de Elik kaj Sire. Ili temas pri la homo kaj liaj problemoj, pri la mondo kaj la socio kaj aliaj gravaj aferoj. Do, vi ne ĉiam ridas, se vi legas ilin, sed iam vi eble eĉ ploras. Aperis tuta kolekto de iliaj verkoj, nome: *La kancerklinikokrestomatio* 1. *Politika Eliksiro*.

La aventuroj de Superzam de Jano estas bildrakonto, kiun ankoraŭ konas multaj esperantistoj,

'Por komencantoj', estas nova rubriko, kiu aperos en ĉiu numero de *La Espero*. Tie aperos artikoloj pri ĉiu temoj, sed en facila lingvaĵo, sen participoj kaj malfacilaj vortoj. Ĉiu rajtas verki por 'Por komencantoj'.

kvankam ĝi aperis nur inter 1973 kaj 1976 en 'Kial ne?', la revuo de Junularo Esperantista Brita. Superuloj aperas en multaj diversaj bildrakontoj. Tre konata estas la usona 'Superman'. Kompreneble 'Super-

zam' estas la esperanta 'Superman'. Eĉ infano komprenas la rakontojn. En la libro *Kial ne?* Festa numero oni povas legi kolekton de bildrakontoj pri 'Superzam'.

Krom tiuj ĉi ekzistas ankaŭ liaj, ekzemple la ĉefe porinfana bildrakonto *Martino*, kiu aperis en 'Monato'. Kiel mi ja skribis, en esperanto aperis ankaŭ tradukitaj bildrakontoj, kiel Tinĉjo, Asterikso, Nudpieda Gen kaj multaj ĉinaj. Tio certe estas bona afero, sed ekster la temo de tiu ĉi artikolo.

Ĉu nova bildrakonto aperos en *La Espero*?

Tio certe dependas de vi, karaj legantoj. Mi invitas vin desegni kaj sendi al mi striojn same grandajn, kiel la strioj en svedaj ĵurnaloj. Kelkajn mi publikigos en la paĝo 'Por komencantoj', kiu aperos en ĉiu numero de *La Espero*.



Broŝuro pri Koreio

Pan-Monda Turismo, agentejo en Seulo, eldonis en Esperanto lukse presitan prospekton pri siaj ekskursoj kaj aranĝoj en Suda Koreio. Petu senpagan ekzempleron de: RM 301 Dankook B/D, 97, Nonhyõn-dong, Kangnam-ku, Seoul 135010, Koreio.

Internacia ekspozicio

Cu mankas al vi materialoj por publika prezento? Nun haveblas la internacia ekspozicio de UEA en du formoj:

- 35 koloraj paneloj, 60 x 85 cm;
- kompleto de 36 lumbildoj (prezo: 84 guldenoj.)

Pruntante la panelojn aŭ aĉetante la lumbildojn, vi ricevas krome detalan gvidlibron. Pliaj informoj: Centra oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Konkurso pri romanoj

La Eldonejo de Hungara Esperanto-Asocio anoncas konkurson por verkado de Esperanta romano. La limdato estas la 31a de decembro 1990. Pri la detaloj vi povas legi en Revuo Esperanto n-ro 1000 (1989 aprilo). Vi ankaŭ povas peti la detalojn de: Eldonejo de HEA, Pf. 193, H-1368 Budapeŝt, Hungario.

Ĉinaj esperantistoj serĉas laboron

Ĉinaj esperanto-parolantaj fakuloj pri elektrona industrio, mekaniko,

konstruo, agrikulturo kaj kuirado serĉas laboron en aliaj landoj. Informoj: Ĉina Investa Kompanio de Eksploatado de Nova Tekniko, Wang Yuchun, Esperanto-Asocio, Academia Sinica, 52 Sanlihe, 100864, Beijing, Ĉinio.

Svahillingva lernolibro

En la svahila aperis *Ne krokodilu!*, traduko de sveda lernolibro, kiun skribis Jan Setréus. Ĝi estas jam sendita al la esperantoklubo en Tanzanio.

Literatura Foiro dudekjara

La kultura revuo fondita de la literatura rondo "La Patrolo" fariĝis dudekjara. Ĝi nuntempe estas dumonata revuo kun 56 paĝoj. Ĝia enhavo, ĉefe beletra, dediĉas grandan atenton al ĉiuj facetoj de la esperanto-kulturo: teatro, muziko, pedagogio, planlingvistiko, kulturpolitiko, movadologio.

Biblioteka terminaro

En Ĉinio aperis biblioteka terminaro esperanta-angla-ĉina-franca-germana-hispana. Ĝin eldonis en 1989 Eldonejo de akademiaj revuoj.

Ĝojaj kaj malĝojaj novaĵoj

En Duala en Kamerunio estas esperanto-grupo kun 205 membroj, kiu rapide disvastigas esperanton en tiu afrika lando. La grupo tamen

renkontis seriozan problemon. Stelistoj ŝtelis iliajn skribmaŝinojn. La grupo nun bezonas fortan subtenon por ne perdi la esperon. Sendu al ili lernolibrojn, revuojn ktp.: Duala Esperanto-Grupo. B.P. 6154 New-Bell Douala, Kamerunio.

Nova redaktanto de Dia regno

Subite mortis en sia 66-a jaro Jan van Keulen, redaktanto de Dia regno. La nova redaktanto nomiĝas Philippe Cousson kaj estas franco.

Paŝadi tra Kubo

Den nya diabildserien "Paŝadi tra Kubo" om Kuba kan beställas från: Diaposervo, EMIAT, Poŝtkesto 23027, Ciudad Habana, Kuba. Pri-set är 33 dollar.

Vojaĝi polimarane

Kiu komunumo volas havi viziton de polimarano, novtipa boato de soveta mediprotekta societo, kiu partoprenos ekspediciojn en Balta kaj aliaj maroj? Se vi loĝas en ĉeĥa-vena kumunumo, kontaktigu kun: Lev Medvedev, pr Mira 196-44, SU-129128 Moskvo, Sovetio

Nova adresaro de Komputila Rondo

Jus aperis la nova adresaro de Komputila Rondo (KompRo). KompRo estas internacia komputora klubo fondita en 1985, kiu ebligas al hobiaj kaj profesiaj komputistoj trovi kontaktojn kun aliaj esperantistaj fakuloj; la adresaro enhavas adresojn el 28 landoj.

Ĉiutaga esperanto: Iom pri gazetoj kaj periodaĵoj

Ekzistas diversaj specoj da periodaĵoj. Organizaĵoj, muzeoj kaj kompanioj eldonas jarlibrojn kaj katalogojn.

Alia tipo da periodaĵoj estas gazetoj. Ekzistas du specoj da gazetoj: ĵurnaloj kaj revuoj. Ĵurnalo aperas ĉiutage aŭ almenaŭ kelkfoje semajne. Ĝia celo estas informi pri novaĵoj al la legantoj.

Revuoj povas esti tre malsimilaj. Ekzistas fakrevuoj pri difinita temo, ekzemple: *La Espero* pri esperanto. Semajnaj novaĵgazetoj informas kaj komentas. Sindikataj revuoj troviĝas en tre multaj hejmoj. Dum la lastaj jaroj hobiaj revuoj fariĝis tre popularaj en Svedio. Ekzistas ankaŭ tradiciaj por-virinaj revuoj, kiuj traktas kuiradon kaj kudradon. Magazino estas populara revuo pri diversaj temoj.

Artikoloj

La plej mallonga formo de artikolo estas notico. Per nur kelkaj linioj ĝi informas pri io. Leganto, kiu eble ne havas tempon legi ĉiujn longajn artikolojn, tamen ofte legas la noticojn. Noticoj tial estas tre gravaj. Iom pli longa artikolo estas informo. Ĝi ofte temas pri aktuala novaĵo.

Pli longa estas raporto. Same kiel la informo ĝi devas esti objektiva, sen persona komento de la aŭtoro. Raporto ofte havas gras-literan enkondukon.

Intervjuo estas longa artikolo kun respondoj de demandoj, kiujn faris la ĵurnalisto.

Ĵurnalisto, kiu verkas priskribon, ne estas objektiva rigardanto de la okazaĵoj. Li mem klopodas klarigi la kaŭzon.

Komentario estas eĉ pli persona opini-esprimo. La verkisto diras sian propran opinion.

Satiroj troviĝas en la limlando inter ĵurnalismo kaj literaturo. La ĵurnalisto ridigas la legantojn pri

Verki artikolon

Ĉu vi volas verki artikolon por iu revuo? Bona ideo! Niaj revuoj daŭre bezonas artikolojn kaj noticojn. Vi tamen pripensu kelkajn aferojn, por ke la ŝanco, ke vi iam vidos vian artikolon presita, estu pli granda.

Kion al kio?

Kion vi volas diri? Ne skribu pri tro multaj diversaj ideoj en la sama artikolo. Se via artikolo estas tro diverstema, ĝi fariĝas tro longa kaj malfacila. Al kiu vi volas diri tion? Se vi verkas science pri nuklea energio kaj sendas la artikolon al scienca revuo, vi certe povas uzi sciencajn vortojn. Se vi verkas pri la sama temo por infana aŭ por populara revuo via artikolo devas esti tute alia.

Kelkaj konsiloj

La artikolo ne estu tro longa. Ofte mankas spaco en la revuo. La redaktanto plej ofte havas malmulte da tempo por mallongigi tro longan artikolon. Ofte li simple devas forstreki la finon. Se via artikolo jam dekomence ne estas tro longa, la ŝanco estas pli granda, ke ĝi ne suferas mallongigon.

Verku en bona esperanto. Se vi mem ne bone regas esperanton, petu ke iu sperta esperantisto kontrolu vian tekston.

Ne uzu vortojn, kiuj ne ekzistas. Se vi opinias, ke estas tute necese krei novan vorton por iu nova invento aŭ simile, unue klopodu uzi vortkunmeton. Tio ja estas la ideo de la esperanta gramatiko. Se vi ne sukcesas uzi kunmetaĵon kaj enkondukas novan vorton vi ĉiokaze devas klarigi la novan vorton.

Ne miksu esperanton kaj nacian lingvon. Se vi en es-

personoj, okazaĵoj ktp. Satiro povas esti ĝentila aŭ malĝentila.

Redaktas la gazeton profesia redaktisto aŭ amatora redaktanto. Granda gazeto havas redaktistaron, kiu laboras en redakitejo. Ĉiuj gazetoj kune nomiĝas la gazetaro.

gazeto: tidning eller tidskrift
(Exakt svensk motsvarighet till ordet saknas.)
gazetaro: pressen

informo: nyhetsartikel
ĵurnalo: tidning
kommentario: kommentar
magazino: vecko-, månadstidning
notico: notis
periodaĵo: periodisk skrift
raporto: reportage
redakti: redigera; -anto: redaktör; -ejo: redaktion (plats); -isto: redaktör; -istaro: redaktion (personal)
revuo: tidskrift, veckotidning
satiro: satir

peranta teksto skribas: "Mi tre ŝatas 'surströmming'." nur svedoj komprenos vin. Ĉiam estas pli bone uzi iom neekzaktan esperantan vorton, ekz "fermentinta baltharingo", ol uzi tute nacian. En nacilingva teksto vi ne uzu esperantan vorton: "La kongresejo" var vackert beläget.

Ne uzu mallongigojn (ne E. aŭ E-o) sed Esperanto aŭ esperanto.

La manuskripto

Ĉiam sendu al la redaktanto facile legeblan manuskripton. Sendu la originalon, ne karbonkopion. La manuskripto estu klare tajpita kun duobla interspaco kaj kun larĝaj maldekstra kaj dekstra margenoj

Al kiu revuo

Al kiu revuo vi sendos vian artikolon? Memoru, ke revuo en esperanto ne aŭtomate estas revuo pri esperanto. Kontakto kaj Monato estas ĝeneraltemaj revuoj, Literatura Foiro kaj Fonto literaturaj kaj La Kancerkliniko politika kaj kultura. Volonte sendu al ili artikolojn pri iliaj temoj, sed informojn pri esperantistaj renkontiĝoj sendu nur al primovadaj revuoj. Movadaj revuoj nur malofte publikigas poezion aŭ beletron. Pli bone estas sendi tion al Fonto.

Ĉu vi volas lerni plu pri la arto verki artikolon. Tiaokaze legu Manlibron pri Ĵurnalismo de Judith Junger & Stefan Maul., eldonita de TK-Stafeto en 1982. Ĉi estas mallonga, sed tre utila manlibro por verkantoj, redaktantoj kaj esperanto-grupoj.

POEZIO

Tial ni ekzistas


-Ne por puni
-Ne por venĝi
-Ne por lukti aŭ murdi
sed por batali
kontraŭ
violento, perforto kaj subpremo
por ke tiuj
kiuj vivos post ni ricevu:
LA LIBERAN MONDON
IAM PROMESITAN...
Tial ni ekzistas

La simileco (klarigo de la margenujoj)

por mi ekzistas
nek alta nek malalta
nek live nek dekstre
nek supren nek malsupren
mi fariĝis
la travidebla inter
bluo kaj ruĝo, bazo kaj acido
mi estas la nulo, la o
inter +i kaj -i
lemuro inter 2 mondoj
sopiras nek foren nek hejmen
ĉar mia loĝejo estas
en la koro de ĉiu vera
vivaĵo

Aina Dahlin (Adolphina Fridolin)
Tradukis: Erica kaj Joakim Enwall

Aina Dahlin naskiĝis en la jaro 1933. Ŝi apartenas al la sindikatisma movado kaj en multaj poemoj kaj artikolon en plej diversaj gazetoj kaj revuoj ŝi kritikis kaj kritikis subpremon kaj la ofte kaŝitan perforton en nia socio.



Oficialaj informoj de la Akademio de Esperanto

n-ro 8: Rezolucio pri la participoj

Dum la Unua Universala Kongreso en Bulonjo-êe-Marò D-ro L.L. Zamenhof kun la tiam Esperantistaro estigis "Akademion" ĝuste por kontroli la evoluon de la lingvo per arbitraria institucio: "Ĉar la tuta esenco de lingvo estas bazita antaŭ ĉio sur interkonsento, tial komuna ĝisnuna uzado devas ludi en lingvo pli gravan rolon, ol seke teoria logikeco; oferi la unuan al la dua mi konsilus nur en tia okazo, se nia Lingva Komitato tion postulus."

La uzado de la participoj montris la eblecon de du interpretaj teorioj same logikaj; sed tiu kun aspektaj valoroj estas la pli malnova, la pli beletra, kaj la Fundamenta. Surbaze de detalaj studoj ankaŭ la Akademio agnoskis la aspektisman signifon de la participoj, kaj neatento al tia decido devas esti konsiderata kiel lingva eraro.

Instigo al eraro aŭ propagando por teorioj kontraŭaj al la agnosko de la Akademio povas konduki nur al skismo kaj disdialektiĝo. Redaktoroj kaj recenzistoj, eldonistoj kaj libroservoj havas grandan respondecon pri la unueco de la lingvo.

Por la Akademio, ties Prezidanto

D-ro André Albault

) Nun la Akademio de Esperanto, kiu "transprenis la celojn kaj laborojn de la antaŭa Lingva Komitato kaj de ĝia Akademio" (Art. 1 de la Statuto).

")) Respondo 47, "Oficiala Gazeto", 1911, p. 291.

n-ro 9: Listo de normaj landnomoj

Tiu listo limiĝas al la geografiaj radikoj, kiuj estas necesaj por ke ĉiu povu kunmeti la tradukon de la oficialaj ŝtatnomoj de la Ŝtatoj-Membroj de U.N. Tiu ĉi monda institucio efektive eldonis tian liston entenantan la oficialajn nomojn, kiujn la ŝtatoj donis al si mem; tiujn nomojn ili donis en la tri lingvoj Angla, Franca kaj Hispana.

Tio signifas, ke en tiu listo ni ne donas kompleksajn nomojn de ŝtatoj; ekz-e, tie oni ne trovas Germana D.R. sed nur German-ujo/German-io. Aliparte estas ŝtatoj, kiuj trudis apartaĵojn de sia oficiala

nomo al la internacia publiko. Tio klarigas la motivon, pro kiu ni listigis landojn ofte nomatajn Britujo/Britio, Salvadoro kaj Lanko sub jenaj formoj: (Grand-)Britujo/(Grand-)Britio, (El-)Salvadoro kaj (Sri-)Lanko. La interkrampojn oni uzos aŭ ne laŭ la grado de oficialeco, kiun oni deziras doni al la teksto. Ĉiuokaze estos ĉiam rekomendite formi simplajn ano-nomojn: Britoj, Salvadoranoj kaj Lankanoj.

La landnomoj apartenas al du klasoj: la ĉefa klaso estas tiu de Land-o...Land-anoj; ĝi entenas la grandan plimulton da nomoj. La dua klaso estas akcesora kaj koncernas nur malplimulton da nomoj; ĝi estas la klaso de Hom-oj... Hom-ujo/Hom-io/Hom-lando.

Fine, ni deklaru, ke tiu listo ne estis establita "ideale". Ni devis kal-

La letero de l'Akademio de Esperanto

N° 7 - Aprilo - Majo - Junio 1989

ISSN 0986-1181



Jena numero de la Letero entenas ĉefe la tri lastajn bultenojn de la OFICIALAJ INFORMOJ DE LA AKADEMIO DE ESPERANTO; tiuj donas la lastajn decidojn de la AĉE kaj temas pri:

- a) la participoj;
- b) la landnomoj;
- c) la propraj nomoj.

La unua prezentita novaĵo nova: ĝi nur memorigas pasintan decidon, kiu restas tre aktuala. Niaj legantoj akvu ĝin. La lasta donas kelkajn opiniojn de nia prezidanto pri la propraj nomoj; nenio vici nova, sed aliento estas donita al la neesperantaj literatoj q, w, x, y, kiuj ĝis nun estas en publiko. Sed pri la landnomoj la decidoj estas dea pli gravaj, ke ili intencas ŝanĝi, kiel ekzemplodona listo. En la Ora Oficiala Aldono jam aperis listeto same ekzemplodona; sed praktike ĝi estas tro mallonga por ke ĝi povu vici multe da voĉoj. La nun aperanta listo obligas traduki la liston publikigitan en la UN-a bulteno pri terminologio, kiu liveras en tri lingvoj (A.F.N.) la nomojn de la Ŝtato-Membroj de tiu monda organizo. Ĝi prezentas du klasojn da landnomoj: la unua entenas la pli multajn nomojn (140), kiuj estas de la tipo Aŭstrio, Aŭstrio-anoj aŭ Aŭstrio-o, Bulteno-anoj; la dua klaso aperas kiel malpli gravaj koncerne nur malplimulton da nomoj (40).

Tuj plendos, ke la AĉE ne reduktis tiujn du klasojn al nur unu: oni devas kompreni, ke tio estas vera reformo. Neĉesu, ke por minimume 40 nomoj la Akademio studu formojn kiajn uzadi? Ĉu ĵure la Akademio elektis nur nomojn en uzado; sed foje ĝi devas fari malĝustan elekton antaŭ la ankoraŭ malnovaj uzoj; devige la elekto ne povas aliparte oni akcii, ke unuokaze elektas por mema kategorio de vortoj oni ja diras marito, marito, sed brosi, brosi, brosi same kiel soldato-o, soldato-o sed regimulo-o, regimulo-anoj. Jen de almenaŭ du aliaj kategorioj de vortoj kun du klasoj; certe vi trovos aliajn. Aliaj jam kelkaj la demando: kiel ni nepo povu nomi? Ĉu la listeto eblas nur konsili: amizu la nomojn de la listo kaj atentu pli ŝanvan bulteno de la OFICIALAJ INFORMOJ, kiu donas kvin rekomendojn pri la landnomoj.

Praktike, ĉiam memoru, ke landnomo estas propra nomo; kiel tia ĝi devas esti minimume modifita. Tute aparte ne aldonu amuzitan -io al tiuj nomoj.

La Akademio de Esperanto eldonas propran gazeton: La letero de l'Akademio de Esperanto. La gazeto enhavas ĉefe la oficialajn informojn de la akademio, sed ankaŭ aliajn artikolojn kaj la respondojn de leteroj de legantoj. La oficialajn informojn ni ekde nun represos en *La Espero*.

kuli kun la kutimoj, kiuj establiĝis dum nia centjara historio. Apartan problemon kreis al ni tiaj landnomoj, kiuj en la uzado apartenis al du klasoj; la Akademio devis tranĉi la Gordian nodon, ne profite al unu nacio, sed ja por la monda profito de la tuta lingvo. Ĝi pardonpetas apud tiuj, kiuj – erare laŭ ni – sentus sin vunditaj de la faritaj elektoj. Ni agis nur por bono de la tuta lingvo.

Mallongigoj:

f-to: Fundamento; la radiko estas Fundamenta.

'8': Oka Oficiala Aldono al la Universala Vortaro.

I. Unua klaso de landnomoj (Lando... Landanoj)

Tiu klaso de "neŭtrale geografiaj nomoj" (Zamenhof), de kiu oni povas unuece formi la nomon de anoj per la sufikso -anoj, konsistigas la ĉefan klason de landnomoj en Esperanto; ĝi entenas la plej multajn el ili (ĉ. 130 el 165). Plie ĝi obeas al la konstato de Boirac, unua Prezidanto de la Akademio: "La ĉefa kaj plej ĝenerala maniero estas nomi primitive la landon kaj devenigi la nomon de ĝiaj loĝantoj per la sufikso -an...; la alia maniero... estas dua, akcesora, sekve en okazo de dubo neniam preferinda" ¹

Afriko⁸, Alĝerio⁸, Andoro, Angolo, Antigvo, Argentino, Aŭstralio⁸, Aŭstrio², Bahamoj, Bangladeŝo, Barbado, Barbudo, Barejno, Belizo, Benino, Birmo⁸, Bocvano, Bolivio⁸, Brazilo⁸³, Brunejo, Burkino⁴, Burundo, Butano, Ĉado, Ĉilio, Domingo⁵, Dominiko, Ebur-Bordo, Egipto⁶, Ekvadoro⁸, Fiĝioj, Filipinoj, Gabono, Gambio⁷, Ganao, Grenado, Grenadinoj, Gujano⁸, Gvatemalo⁸, Gvineo⁹, Gibutio, Haitio¹⁰, Honduro, Indonezio, Irako⁸, Irano⁸¹¹, Irlando⁸, Islando⁸, Israelo¹², Jamajko, Jemeno, Jordanio, Kameruno, Kampuĉeo, Kabo-Verdo, Kanado⁸, Kataro, Kenjo, Kipro, Kiribato, Kolombio¹³, Komoroj, Kongolo, Koreo¹⁴, Kostariko⁸, Kubo⁸, Kuvajto,

La landaj asocioj en Koreio/Koreo kaj Nov-Zelando/Zelando aperigis fortajn protestojn kontraŭ la decido de la akademio. Verŝajne la lasta vorto ankoraŭ ne estas dirita pri landnomoj. Kaj Monato kaj Revuo Esperanto decidis ne obei la decidon de la akademio. La debaton pri landnomoj vi povos sekvi en internaciaj revuoj. La Espero ne aperigos debatajn artikolojn pri la temo.

(Sri-)Lanko, Laoso, Lesoto, Libano⁸, Liberio⁸, Libio⁸, Lihtenŝtejno, Luksemburgo, Madagaskaro¹⁵, Malajzio, Malavio, Maldivoj, Malio, Malto, Maroko⁸, Maŭricio, Meksiko⁸¹⁶, Monako, Mozambiko, Nauro, Nederlando⁸, Nepalo, Neviso, Niĝero, Niĝerio, Nikaragvo⁸, Omano, Pakistano⁸, Panamo⁸, Papuo¹⁷, Paragvajo⁸, Peruo⁸, Principeo, Ruando, Salomonoj, (El-)Salvadoro, Samoo, San-Marino, Sao-Tomeo, Seŝeloj, Senegalo¹⁸, Sent-Kristofa, Sent-Lucio, Sent-Vincento, Siera-Leono, Singapuro, Sirio⁸, Sovetio¹⁹, Sudano⁸, Surinamo, Tajlando²⁰, Tajvano, Tanzanio, Tobago, Togolo, Tongo, Trinidado, Tunizio⁸, Tuvalo, Ugando, Ukrainio²¹, Urugvajo⁸, Usono²², Vanuatuo, Vatikano²³, Venezuelo⁸, Vjet-Namo, Zairo, Zambio, Zelando, Zimbabvo.

Eksterliste: Groenlando/Gronlando, Siberio.

II. Dua klaso de landnomoj (Homoj... Homujo/Homlando...)

Tiuj landnomoj estas derivaĵoj de landano-nomoj kaj estas diverse formitaj: Per sufikse uzataj vortoj (-land-, -istan-, ...) aŭ per sufiksoj (-uj-, -i-). Tiu maniero formi landno-

mojn "estas dua, akcesora, sekve en okazo de dubo neniam preferinda" (Boirac 1). La sufikso -uj- "servas por elfari nomojn... de landoj, sed nur kiam oni nomas landon per la nomo de la gento aŭ nacio ĝin loĝanta" (Boirac 1). La sufikso -i- en tiaj kazoj povas anstataŭi la sufikson -uj-, sed principe "nur se tiel ĝi formas internacian nomon" (Cart).

1-a grupo: Sufikso -ujo aŭ sufikso -io

En tiu grupo la du sufiksoj estas egale uzablaj; estas rekomendite uzi nur unu saman en difinita teksto.

a) la io-formo estas sendube internacia

Albanujo/Albanio⁸, Arabujo/Arabio⁸, Belgujo/Belgio⁸, Belorusujo/Belorusio, Bulgarujo/Bulgario⁸, Ĉeĥoslovakujo/Ĉeĥoslovakio, Etiopujo/Etiopio⁸, Francujo/Francio (f-to), Germanujo/Germanio (f-to), Grekujo/Grekio⁸, Hispanujo/Hispanio (f-to), Hungarujo/Hungario⁸, Italujo/Italio⁸, Jugoslavujo/Jugoslavio, Maŭritanujo/Maŭritanio, Mongolujo/Mongolio, Norvegujo/Norvegio⁸, Rumanujo/Rumanio⁸, Somalujo/Somalia, Svedujo/Svedio⁸, Turkujo/Turkio (f-to).

Eksterliste: Armenujo/Armenio, Estonujo/Estonio, Latvujo/Latvio, Rusujo/Rusio (f-to).

b) la io-formo estas Slave internacia, sed de Latina deveno

Danujo/Danio⁸, Portugalujo/Portugaliao

Eksterliste: Anglujo/Anglio (f-to).

c) la io-formo estas ne internacia pro la uzata radiko (Grand-)Britujo/(Grand-)Britio, Hindujo/Hindio²⁴

ĉ) la io-formo estas ne internacia, ĉar la radiko devus aparteni al la unua klaso (Ili apartenas al la arkaika sistemo ("Amerikoj vivas en Amerikujo"). Sed ili estas tradiciaj, de ĉiuj uzataj kaj ne kontestataj.

Cinujo/Ĉinio, Japanujo/Japanio²⁵

2-a grupo: Sufikse uzata vorto -lando

a) La nomo estas sendube internacia

Finnlando, Svazilando

Eksterliste: Skotlando²⁶

b) la nomo estas akceptebla Esperantismo

Pollando, Svislando

3-a grupo: Sufikse uzata vorto - (i)stano

Afganistano

Eksterliste: Kirgizistano, Uzbekistano

Ŝtatnomoj

Surbaze de la normigitaj landno-

moj kiu ajn povos mem formi ŝtatnomojn helpante sin per pliaj vortoj troveblaj en la vortaroj. Ekzemple, surbaze de la nomo German-ujo/German-io, eblos formi la ŝtatnomon Demokratia Germana Respubliko helpante sin per la vortoj demokratia kaj respubliko.

La plej multaj el tiuj "help-vortoj" jam estas Fundamentaj aŭ Oficialaj. Tamen kelkaj eĉ ne estas registritaj en P.I.V. Ili enkondukigos per si mem laŭ la kreskanta uzado. Aliaj troviĝantaj en P.I.V. meritis esti oficialigitaj, sed ni kontentigos enmeti ilin en anekso al la listo de normigitaj landnomoj: estas ja malfacile antaŭvidi daton de proksima Oficiala Aldono. Fine kelkaj derivitaj vortoj aperos ankaŭ en tiu anekso, kune kun kelkaj propraj nomoj. Ni do havos jenan liston plurpartan.

A. Vortoj ne-oficialaj aperantaj

en P.I.V.

dominio	Islamo
nomarko	soveto
federala nomarkio	kooperativo
unio	

B. Teritorioj regataj de diversaj

tradiciaj estroj

(Kun la UNO-tradukoj al A.F.H.)

duk-io	duchy duché ducado
emir-io	emirate émirat emirato
princ-io	principality principauté principado
reĝ-io	kingdom royaume reino
sultan-io	sultanate sultanat sultania

C. Adjektivoj kun politika

senco

(Same kun tradukoj al A.F.H.)

federativa	federative fédératif(-ve) federativo(-a)
socialista	socialist socialiste socialisto(-a)
sendependa	independent indépendant independiente
unia/unuigita/ unuiginta	united uni unido(-a)

C. Propraj nomoj de dinastioj

(Kun tradukoj al A.F.H.)

Haŝima	Hashemite hachémite hachemito(-a)
Saŭda	Saudi saoudite saudito(-a)

D. Ŝtataj reĝim-nomoj

Gamahirio (el la Araba: Jamahiriyah, lando

Havanna 1990

Nu ĝar det bra att anmäla sig till den internationella esperantokongressen i Havanna 14-21 juli 1990. Om du anmäler dig före 31 december får du den lägsta kongressavgiften.

Kongressavgiften i svenska kronor

	Till 31/12 1989	Till 31/3 1990	Fr o m 1/4 1990
1 Direkt medlem i UEA	575	720	865
2 Icke direkt medlem i UEA	720	865	1000
3 Medföljande/ handikappad eller ungdomar t o m 25 år som är direkta medlemmar i UEA	290	430	575
4 Medföljande/ handikappad eller ungdomar t o m 25 år som inte är direkta medlemmar i UEA	430	575	720

Beställ anmälningsblankett hos Lisbet Andreasson, Södra Rörum pl 455, 242 94 Hörby, tel 0415-501 52. Blanketten skall sedan skickas tillbaka till samma adress. All betalning sker till postgiro 14 74 29-5 Esperantoförbundets specialkonto, Hörby. Ange på talongen vad betalningen avser.

Komonvelto (de la amasoj)
(el la Angla: Commonwealth,
lando de komuna bonfarto)

¹ Antaŭparolo al la "Plena Vortaro Eo-Franca kaj eo-Esperanta" (1909)

² Sed eblos diri: **Aŭstro-Hungario**. Esence la radiko aŭstr- signifas oriento; ĝi aperas kiel mallongigo de **Aŭstrio** en kunmetaĵoj.

³ La ĉefurbo estas **Braziljo**, laŭ la Portugala prononco.

⁴ "Faso" (en Burkina Faso) ne tradukiĝas: ĝi signifas "hejmlando, patrio". Antaŭe: Supra-Volto.

⁵ Ni reprenis malnovan nomon, ĉar transskribo de "Dominicana" konfuzigus kun "anoj de Dominiko". - Kp. noton 10.

⁶ Ekskluzive uzata en la ĉefverka traduko de Kabe "La Faraono". Ni preferu tiun formon omaĝe al nia granda verkisto.

⁷ Pro peto de la Gambia Prezidento kaj interveno de Senegalo kreiĝis inter la du landoj konfederacio sub la nomo Senegambio (dec. 1981).

⁸ **Gujano**, nova formo de sendependiĝinta ŝtato (Guyana), kun ĉefurbo Geortaŭno, eks-brita **Gviano** (Guiana); apartenas al la regiono de **Gvajanoj**, kune kun **Surinamo** (eksa Nederlanda Gviano) kaj la **Franca Gviano**, krom la **Venezuela kaj Brazilaj partoj de Gvajanoj**.

⁹ Nomo de kvar ŝtatoj, el kiuj tri respublikoj: **Res. Gvineo**, **Res. Gvineo-Bisaŭo** (ĉefurbo: Bisaŭo, kaj **Ekvatora-Gvineo** (antaŭe kaj respektive: Franca, Portugala kaj Hispana Gvineoj). La kvara estas monarkio: **Papuo-Nov-Gvineo** (vd. noton 17).

¹⁰ **Respubliko Haitio** okupas la okcidentan parton de la insulo **Hispaniolo**, dum la **Dominga Respubliko** - la orientan.

¹¹ Kun la Persa lingvo (kaj la iama Persujo/Persio).

¹² Kun la Hebrea (f-to) lingvo.

¹³ Ne konfuzu kun **Kolumbio**, Usona federala distrikto kun ĉefurbo Vaŝingtono.

¹⁴ Nomo monde internacia. La korea etno nomiĝas Hanoj; sinonimo por la lando: **Hanlando**. Ne konfuzu Hanoj kun Hanoj, ĉefgento de Ĉinio.

¹⁵ Kun la Malagasa lingvo.

¹⁶ Sed: urbo **Meksiko** aŭ **Meksiko-urbo** (H. Ciudad de Meksiko, A. Mexico City...).

¹⁷ **Papuo-Nov-Gvineo** rezultas el unuigo de **Nov-Gvineo** sub protekto de **Aŭstralio** kaj de **Papuo**, ankaŭ nomita **Aŭstralio Nov-Gvineo**; cetera la tria parto de la sama insulo estas la **Okcidenta Nov-Gvineo**, nun **Iriano** (dependaĵo de Indonezio).

¹⁸ Vd. noton 7.

¹⁹ Ne prete utila pro sia derivaĵo: **Sovetianoj**; ĝi estas mallongigo por **Sovet-Unio**, kies plena oficiala nomo estas: **Unio de Sovetaj Socialistaj Respublikoj**, kiun oni iafoje skribas sigle: **U.S.S.R.**

²⁰ Iuj **Tajoj** estas nacioj de aliaj landoj: **Birmo**, **Laoso** (Tajloj)...

²¹ La landnomo signifas proksimume: **Landlima lando**: **Tial** estas eraro nomi per ĝi la landanojn.

²² Tradicia mallonga nomo por **Uniaj/Unuigitaj Ŝtatoj de Ameriko** (U.S.A.).

²³ Teritorio. Sed en Ekleziaj rilatoj oni kutimas uzadi: **Sankta Seĝo** (Rim. de U.N.)

²⁴ En tiu federala lando estas parolataj ĉ. 14 oficialaj lingvoj ŝtataj (la **Hinda**, **Bengala**, **Telugua**, **Marata**, **Tamila**, **Urdua**, **Gugarata**, **Malajalama**, **Kannada**, **Orija**, **Pangaba**, **Asama**, **Kaŝmira**, **Sinda**) krom ĉ. 125 aliaj parolataj de 13% de la popolo. Plie du lingvoj estas federalaj: **La Angla** (parolata de 1% de la popolo) kaj **la Hinda** (ĉ. 30 % de la popolo). Jam de pluraj jarcentoj la lando nomiĝas en la diversaj **Hindiaj lingvoj** "Bharata", aŭ laŭ misformiĝoj de tiu **Sanskrita** nomo; tiu oficiala nomo liveras sinonimon al nia lingvo: **Barato**. - La rivernomo **Indo** naskis diversajn nomojn: **Indonezio**, ... kaj **Indo-Eŭropa** (uzata jam de **Cart** kaj de **Privat**), **Indo-Irana**, ...

²⁵ Sinonimo: **Nipono**

²⁶ Sed la **Kanada provinco** estas **Nova-Skotio** (Nova Scotia).

n-ro 10

Rekomendoj pri propraj nomoj

1. La Akademio agnoskas, ke ĉiu ajn rajtas esperantigi sian nomon laŭ sia bontrovo. Ĉiu rajtas ankaŭ elekti pseŭdonimon aŭ plumnomon por si.

2. La Akademio ankaŭ agnoskas, ke ĉiu ajn rajtas konservi sian aŭtentan nomon laŭ la originala ortografio, se nur ĝi estas skribita per **Latinaj literoj**. Li tiam devas toleri, ke la specialaj supersignoj aŭ aliaj signoj de lia lingvo eventuale malaperos; ankaŭ ke lia nomo estos prononcita en alia maniero ol en lia lingvo.

Se la kvar ne-Esperantaj **Latinaj literoj q, w, x kaj y** aperos en la originala skribo de la nomo, la Akademio konsilas prononci ilin jene:

q kiel k; kaj qu kiel kv

w kiel v en nomoj de Germana aŭ Pola deveno; ankaŭ de **Nederlanda** deveno.

w kiel la w de la Internacia Fonetika Alfabeto, por ĉiuj aliaj lingvoj.

x kiel ks.

y kiel j, se antaŭ aŭ post vokalo, y kiel i en aliaj okazoj.

3. La Akademio konstatas, ke la granda plimulto de personoj el aliaj skribo-regionoj jam kutimas transskribi siajn nomojn per la **Esperanto-alfabeto**. Tamen malplimulto transskribas siajn nomojn laŭ kutimoj de aliaj lingvoj: ordinare temas pri la **Angla** aŭ la **Franca**; sed povas esti ankaŭ laŭ la preskribo de la oficiala **Latina** transskribo por la koncerna nacia lingvo (kazo de la **Ĉina** kaj de aliaj).

4. La Akademio konsilas, ke neniu trudu al aliaj personoj manieron ŝanĝi aŭ transskribi sian nomon eĉ skribe. Propra nomo estas apartenaĵo de ĉiu individuo.

"Moskvaj Novajoj" en Esperanto!

Ciuj, kiuj interesigas pri la nun rapidege disvolviĝantaj okazaĵoj en Sovetio, certe konas la nomon de tiu prestiĝa sovetia gazeto, kiu de antaŭe jam aperas en naŭ lingvoj (rusa, angla, araba, hispana, franca, germana, greka, hungara kaj itala). Dum la lastaj jaroj ĝuste tiu ĉi gazeto elstarigis pro sia aŭdace malkaŝema kaj progresema raportado pri la problemoj, diskutoj kaj ŝanĝiĝoj en tiu mondpolitike gravega lando. En Sovetio mem, ĉiu ekzemplero estas legata de dekoj da homoj. En eksterlando ĝi estas grava fonto de informoj, ofte citata de amaskomunikiloj.

Nun aperis unua provnumero de tiu gazeto en Esperanto. Datita "Aprilo 1989", ĝi enhavas multon da interesa materialo. Legeblas longa intervjuo kun du historiistoj, kies studoj pri la Stalin-epoko antaŭ du jaroj estus nepublikigeblaj – titolo de la artikolo: "Triumfo de la tirano, tragedio de la popolo." Enestas kritikaj artikoloj pri la kreskanta krimeco, kaduka pensi-sistemo, malbona prizorgo de la regionoj, kiujn trafis la ĉernobila katastrofo. Speciale por ni esperantistoj troviĝas ankaŭ interesa artikolo pri la longedaŭra subpremo de la sovetia Esperanto-movado kaj ties ĵusa renaskiĝo en formo de nova tutlanda organizo, Sovetrespublikara Esperantista Unio (SEU). Krome enestas ankaŭ literatura suplemento, kun tradukoj de poemoj de i.a. Puŝkin, Lermontov kaj Aĥmatova.

Mi citu la redakcian noton: "Ĉu estos Esperanto la deka lingvo – dependas de vi... Se vi havas sufiĉan intereson pri la provnumero kaj reeĥos senprokraste al la redakcio, sincere esprimos vian opinion pri ĝi... se vi pretos ĝin aboni kaj avide legi. Tiu ĉi provnumero aperas danko al tiu naŭdeko da leteroj (el 18 landoj), kiuj pledis por aperigo de MN en Esperanto, sed tiu kvan-

to da interesitoj ne povas esti sufiĉa por regula eldonado... La regula ekzisto de la eldonaĵo en Esperanto, ĝia ofteco kaj prezo dependas de viaj reeĥoj. Ni atendas."

Tio starigas la Esperanto-komunumon antaŭ grava provo – ĉu ni estas sufiĉe maturaj por pluvivigiti tian iniciaton, kiu samtempe alportus la utilojn de pli informita esperantistaro, evoluigo de la esperantlingva ĵurnalismo kaj pli vasta rekono de Esperanto kiel serioza komunikilo (kaj krome signifus gravan

apogon al la sovetia Esperantomovado)? Mi esperas, ke jes.

Mendu la provnumeron, legu ĝin kaj poste skribu al la redakcio! Sufiĉe granda stoko nun troviĝas en Stokholmo, alportita de sovetiaj gesamideanoj. Mendu vian ekzempleron pagante 15.- kronojn al la poŝtgira konto 8 88 02-4, La Ranetoj. El tiu prezo, kvin kronoj estas por sendokostoj kaj dek iros rekte al la financigo de Esperantista Muzik-Videa Centro en Sovetio.

Per Aarne Fritzon

RECENZO

Nu tre "nycklar"

Det är viktigt att komma ihåg vilken målgrupp man har när man informerar om esperanto. Språkprofessorer behöver annan slags information än affärsmän, och mellanstadieelever annan än gymnasister.

Esperanto! Nyckel till det internationella språket

*Esperantoförlaget,
Malmö 1986, 47 s*

Det vi vanligtvis kallar "nyckeln", har kommit ut i en ny och utökad svensk upplaga för några år sedan. Ursprungligen kom nycklar med ordlistor från esperanto till olika språk till för att man skall kunna skicka brev på esperanto till personer i olika länder och bifoga en esperantonnyckel på mottagarens språk. Vanligtvis har esperantonnyckeln blivit en skrift man delar ut till esperantointresserade.

Introduktion till esperanto

*Bertil Nilsson, Vidya förlag 1989,
30 s*

Den här nyckeln är en utmärkt främst för språkintresserade. I häftet redogörs för esperantos uttal och grammatik. På de sista sidorna finns några texter som läsaren kan översätta till svenska. Även förslag på ytterligare litteratur och adresser till esperantoorganisationer finns med.

Esperanto, fickordlista svenska-esperanto

*Malte Markheden, KB Progreso
eldonejo, Motala 1989, 25 s*

En mycket kort information om esperanto och en svensk-esperantisk ordlista. Lämplig tex vid besök i skolor, där eleverna ofta vill veta vad olika ord heter på esperanto. Dessutom lämplig som en första ordlista för kursdeltagare.

Tre utmärkta hjälpmedel för esperantoinformation, om de används för rätt målgrupp.

Leif Nordenstorm

Hur tar vi vara på förenings- kvällarna?

Under 1990 kommer vi att ta upp ett alltid aktuellt ämne. Hur tar vi vara på föreningskvällarna i våra esperantoklubbar. Det har visat sig att våra esperantoklubbar fungerar mycket olika. I vissa klubbar kommer många medlemmar till mötena, men det finns också andra klubbar med många medlemmar som sällan samlar mer än en handfull på sina möten.

En av orsakerna till detta problem är att medlemmarna är så olika. Somliga är skickliga esperantister som gärna pratar esperanto hela tiden. Andra är nybörjare som helt enkelt vill träna språket. Hur löser man det här problemet? Skall man ha olika slags möten för olika kategorier?

Andra frågor som kommer att tas upp under rubriken 'Niaj kluboj' är:

- Behöver vi byta uppdrag då och då för att upptäcka nya gåvor hos oss själva och andra? Den som varit kassör i tio år kanske passar bättre som lärare och den som varit ordförande i tjugo år och aldrig tyckt om att administrera kanske är en talang när det gäller närradio.

- Vilka föreningskvällar som er klubb har genomfört har slagit väl ut? Många styrelser tycker att det är svårt att hitta på meningsfulla program och behöver tips.

- Har ni i er klubb goda erfarenheter av att bjuda in eller besöka andra föreningar?

Alla är välkomna att skriva och berätta om hur en klubb kan fungera, bör fungera eller inte bör fungera.

Leif Nordenstorm

Kalendaro

decembro

- 27 dec - 3 jan Internacia Festivalo, por 25-50-jaruloj kun aŭ sen infanoj, Sensenstein, Kassel (Hans-Dieter Platz, Maikammerer Str 21, D-6731 St Martin, FR Germanio)
- 27 dec - 3 jan Internacia Seminario, por gejunuloj, Sensenstein, Kassel (Germana Esperanto-Junularo, Rheinweg 15, D-5300 Bonn 1, FR Germanio)

januaro

- 8 jan - 9 mar Kurso por komencantoj, Karlskoga (vidu la anoncon en *La Espero* 1989:4)

marto

- 12 mar - 11 maj Daŭriga kurso, Karlskoga (vidu la anoncon en *La Espero* 1989:4)

aprilo

- 13 - 16 Paska renkontiĝo, Vierhouten (Nederlanda Esperanta Junularo, Lilian van der Burgt, Postbus 528, NL-6200 AM Maastricht, Nederlando)
- 13 - 20 6a Printempa Semajno Internacia, por familia aranĝo en Todtmoos, Sudokcidentgermanio (Hedwig Fischer, Gustav-Adolf-Str. 2a, D-4418 Nordwalde, FR Germanio)

majo

- 18 - 20 Sveda esperantokongreso, Karlskoga (Informoj venos en *La Espero*)
- 24 - 27 3-a Kultura Esperanto-Festivalo, Västerås (Informoj venos en *La Espero*)
- 25 - 30 3-a Internacia Akademia Konferenco Pri Scienco kaj Tekniko en Esperanto, Beijing, Ĉinio (Sciencist-Teknikista Esperanto-Asocio sub la Ĉina Akademio de Sciencoj, 52 Sanlihe, 100864 Beijing, Ĉinio)

junio

- 4 - 10 Esperanto-kurso por geskoltoj, Kimito, Finnlando (Carola Antskog, Källkullen, SF-25700 Kimito/Kemiö, Finnlando)
- 11 - 15 5a Internacia kurso, Nordiska folkhögskolan, Kungälv
- 15 - 16 Bicikla konkurso "Vätternrundan". (Esperantista teamo: Anita Bergh, Hasselgatan 60, 194 37 Upplands Väsby, tel. 0760-85872)

julio

- 9 - 14 Someraj kursoj, Karlskoga (vidu la anoncon en *La Espero* 1989:4)
- 14-21 Universala Kongreso, Havanna (vidu la anoncon en *La Espero* 1989:4)
- 14 - 23 23a Internacia Renkontiĝo Naturamika, nybörjar- fortsättningskurser, turistarrangemang, Abaliget, Pécs (IREN, Departementa komitato de HEA, Hungara Esperanto-Asocio, Pécs, Pf. 2. H-7601 Ungern)
- 23 - 29 Internacia Junulara Kongreso, Kubo (informoj venos en *La Espero*)
- 23 - 29 Kvinpinta Semajno, Finnlando (informoj venos en *La Espero*)

Pli da svedoj sukcesu en Belartaj Konkursoj

Dum la lastaj jaroj kelkaj svedoj gajnis premiojn en la Belartaj Konkursoj. La Espero ĉi-jare publikigas la regulojn de la Belartaj Konkursoj kun la espero ke eĉ pli multaj svedoj partoprenos, kaj eble gajnos...

La Belartaj Konkursoj de UEA celas evoluigi la artojn, en kaj pere de la Internacia Lingvo. Ili okazas ekde 1950 en la Universalaj Kongresoj. Rajtas konkursi ĉiu esperantisto.

Branĉoj

1. Originala poezio; 2. Originala prozo; 3. Originala eseo; 4. Originala teatraĵo; 5. Kanto; 6. Fotografio; 7. Infanlibro de la jaro.

Premioj por branĉoj 1, 2, 4, kaj 6: unua 310 guldenoj; dua 217 guldenoj; tria 124 guldenoj; Nova Talento (plej bona konkursanto neniam antaŭe premiita) 217 gld.

La nomo de la Nova Talento aperas sur la pokalo "Henry Harabagiu".

En la tria branĉo estas aljuĝata unu premio, Premio Luigi Minnaja, kies valoro estas la jara rento de 4000 guldenoj (ĉ. 300 gld.).

En la kvina branĉo estas aljuĝata unu premio de 310 gld., Premio Anokin pri Kanto.

La sepa branĉa proponas premion de 651 gld. al tiu eldonejo, kiu en la antaŭa jaro eldonis la plej elstaran infanlibron.

Reguloj

konkursajoj por la branĉoj 1-5 devas esti senditaj en po 4 ekzempleroj al la sekretario: Osmo Buller, P1 272, SF-90101 Oulu, Finnlando. Por la branĉo 5 oni sendu muziknotojn kun teksto. Tiuj konkursajoj alvenu ĝis la 31a de marto de la koncerna jaro. Oni aldonu 5 internaciajn respondkuponojn por ĉiu branĉo, en kiu oni konkursas.

Konkursajoj por branĉo 6 estu senditaj en unu ekzemplero al "Foto-konkurso", adreso de la loka kongresa komitato de la koncerna Universala Kongreso, (por 1990: LKK, Kuba Esperanto-Asocio, Apartado postal 2018, C-10200 La Habana 2, Kubo) por alveni ĝis la 1a de julio. La fotoj estu teme ligitaj al la Internacia Lingvo aŭ al la kongresa temo.

En la branĉoj 1-6 rajtas partopreni nur verkoj, kiuj ne aperis en presita formo, kaj ili devas esti signitaj per pseŭdonimo.

Por branĉo 7, Infanlibro de la jaro, oni sendu tri ekzemplerojn de la libro al la Centra Oficejo de UEA ĝis la 31a de marto.

La kompleta regularo de la Belartaj Konkursoj estas senpage ricevebla de la CO de UEA.

Pensiulo

Vekiĝas je fruaj matenhoroj,
multaj taskoj atendas
taskoj, kiujn mi ŝatas.
Pulso de l' vivo plirapidas
post la pensiigo.

Spertis laboran ĝojon
dum la pentrista rondiro
de domo al domo
kaj ĝojis pri la faroj libertempaj,
kiuj nun plenigas min tute
- - - sentas min utila,
celkonscia,
pli juna ol antaŭe.

La vivo pluen iras en ekzistado,
plenigata de krea ĝojo.

Jim Hornö

Sur la bretaro

Esperanta songazeto 6	90.-
Libro de amo	67.-
Malegalaĵoj – Ĉu fato?	10.-
(Markheden) Esperanto-fickordlista	12.-
BOULTON, Zamenhof	114.-
CORSETTI, Knedu min, sinjorino!	30.-
EICHHOLZ, Esperanta boldvortaro	440.-
ERASMO, Laŭdo de la stulteco	95.-
GOSCINNY, Asteriks la gaŭlo	69.-
HOLMBERG, Ture Sventon en Londono	73.-
NIKOLIN', Nur per amo	90.-
NIKOLIN', La Esperanto-knabino	50.-
NILSSON, Introduktion till Esperanto	15.-
PRIVAT, Aventuroj de pioniro	57.-
SCHWARTZ, Kiel akvo de l' rivero	264.-
SHAKESPEARE, La dresado de la megero	71.-
TEAM, Ora Team'	100.-
TILLEUX, Zamenhof boldrakonte	25.-

Tra la lando

Svedo akademiano

Christer Kiselman, profesoro pri matematiko en Uppsala, elektigis ano de la Akademio de Esperanto. Ni ĝojas kaj gratulas.

Kultura Esperanto-Festivalo

Kultura Esperanto-Festivalo, kiu okazis en Uppsala en 1986 kaj en Lund en 1988 okazos en Västerås 24-27 majo 1990. KEF estas eksterordinara okazo ĝui esperantan teatron, muzikon, prelegojn ktp dum kelkaj tagoj. Jam nun notu la tagojn en via kalendaro. Pliaj informoj venos.

Nova nomo

Stockholms esperantoförening, fondita en 1898, havas novan nomon. Ĝi nun nomiĝas Esperanto-klubben i Stockholm/Esperanto-klubo de Stokholmo. La mallongigo estas EKS.

Kristliga Esperantoförbundet

Aven KEF har haft sitt årsmöte i Norrköping i år. Förbundet har 203 medlemmar.

Radio Esperanto por tuta Skanio

Ekde la 1-a de januaro 1990 oni aŭdigos la programojn de Radio Esperanto en Malmö per 100 ŭatoj.

La ĝisnuna povo estas 10-20 ŭatoj. Tiam la programoj estos aŭdeblaj en grandaj partoj de Skanio kaj en Kopenhago. Vi certe komprenas ke tiam estos novaj eblecoj por Radio Esperanto en Malmö. Aŭskultu merkrede 10.00-10.30 je 89.2 megahercoj kaj la resendon ĵaŭde 17.30-18.00 je 90.2 megahercoj.

Kie estas la bengala libro?

En la SEF-kongreso en Sundsvall Karl Buremo rakontis pri la esperanto-movado en Hindio kaj montris boŝuritan libron en esperanto

kaj la bengala. Bedaŭrinde la libro, kiu apartenas la esperanto-klubo en Jönköping, malaperis. Se iu erare kunportis ĝin, sendu ĝin al: Karl Buremo, Vallmostigen 29, 552 46 Jönköping.

Esperanto-litteratur i Göteborg

Stadsbiblioteket i Göteborg har en stor samling böcker på esperanto, både fack- och skönlitteratur. Sedan katalogen över samlingen kom ut i juli 1988 har samlingen ytterligare vuxit. Böckerna kan lånas över hela landet genom de lokala biblioteken. Utnyttja denna möjlighet.

Esperanto lotteriet

Lottpris 20 kr. Vinst på var åttonde lott.
Beställ lotter på telefon 0590-302 08
eller på adress: Espero 89, Box 80,
682 01 Filipstad.

Vid förskottsbetalning till SEF:s lotterikonto, postgiro 444 02 45-1 portofritt. Om du önskar lotterna mot postförskott tillkommer 15 kr per försändelse.

VINSTPLAN

5 st högvinster: Svenska statens premieobligationer till ett totalt vinstvärde av 10 000 kr (5 000, 2 000 och 3 x 1 000).

Fördelningsdragning sker när lotteriet är slutsålt.
630 st direktutlämnade vinster: presentkort valfritt KF eller Svenska köpmannaförbundet eller nya lotter, enligt följande:

10 st á 500 kr, 20 st á 250, 100 st á 100 kr.

Sten SYENONIUS
Erikstorpsgratan 26 A
21754 MALMÖ

SEJU

Sveda Esperantista Junulara
Unuiĝo
Sveriges Esperantisters
Ungdomsförbund

Adreslisto de la estraranoj de SEJU 1989-90

Prezidanto: Lena Månsson
Möregatan 9, 2 tr
116 27 Stockholm
Tel: 08-40 88 92

Vicprezidanto: Berit Posthuma
Grödingevägen 19
147 31 Tumba
Tel: 0753-339 28

Sekretario: Camilla Persson
Gärdgatan 6, Östansjö
694 00 Hallsberg 2
Tel: 0582-520 87
aŭ semajne: 011-15 38 89

Vicsekretario: Heléne Brännmo
Nackstavägen 22 C
852 47 Sundsvall
Tel: 060-17 07 72

Kasisto: Mikael Hultgren
c/o Åkesson
Katarinavägen 18
116 45 Stockholm
Tel: 08-40 38 14

Estrarano: Kajsa Larsson
c/o Björk
Birkagatan 16 C, 4 tr
113 39 Stockholm
Tel: 08-31 08 76

Estrarano: Malin Söderback
c/o Norlén
Korpvägen 5
352 42 Växjö
Tel: 0470-472 73

Anstataŭanto: Lorena Diaz
Gallardo
2:a Bjurhovdagängen 22
723 52 Västerås
Tel: 063-13 37 24

Anstataŭanto: Per Aarne Fritzon
Möregatan 9, 2 tr
116 27 Stockholm
Tel: 08-40 88 92



INVITO AL VÄTTERNRUNDAN

Biciklu kun ni en "Vätternrundan" la 15an - 16an de junio 1990. La starto estos en Motala, kaj la fino, kiun vi atingos post 300 kilometroj ĉirkaŭ la lago Vättern, estos ankaŭ tie. Vi bezonos biciklon, kaskon, biciklan trejnadon kaj bonan humoron. Vi havas bonan tempon por prepari vin dum la printempo, krome vi fartos tre bone pro tio.

Mi proponas, ke ni aranĝus unu aŭ plurajn grupojn, depende de kapablo kaj intereso, por starti kune.

Ni uzos dekalojn (vidu supre), grandajn je 100 mm, ĉar ni devas esti videblaj. La kotizo estas ĉirkaŭ 400 SEK kaj tio enkalkulas manĝaĵon kaj trinkaĵon ĉe naŭ deponejoj dum la biciklado.

Vi devas esti minimume 18 jara.

La telefonnumero al Vätternrundan estas 0141/547 90.

Por pliaj informoj kaj aliĝo kontaktu:

Anita Bergh, Hasselgatan 60,
194 37 Upplands Väsby, tel 0760/858 72